

Svisa Esperanto-Societo informas

1999 numero 3a: junio / julio / aŭgusto

Redakcio:

Claude GACOND, Poŝtfako 5031, CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5

☎ ĉe CDELI: 032 967 68 55, hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29; indiki: por Claude Gacond

Vivo de SES

SES-tagoj en Zürich 15-16 majo 1999

Mi memoras, ke antaŭ multaj jaroj, kiam la bulteno de SES ankoraŭ nomiĝis *Svisa Esperanto-Revuo (SER)* kaj estis redaktita de Andres BICKEL, mi tre vigle defendis la utilon de la Regionaj Semajnfinoj de SES. Laŭ mi ili ne nur necesas por alporti esperantian kulturon en ĉiujn svisajn regionojn, sed ankaŭ ebligas al nia lingvo ludi sian rolon, tio estas proksimigi homojn de diversaj kulturoj. Tian konvinkon mi ne perdis kaj mi revenas ĉiam el la SES-tagoj kun granda entuziasmo.

Por iri de la centra stacidomo al la kunveno, en la tute novan laborlokon de Dietrich WEIDMANN, necesas trairi la plej etosplenan kvartalon de Zürich en la malnova urbo, kaj, ekde la Grossmünster-katedralo, daŭrigi rekte ĝis Stadelhofen-stacidomo, kaj ankoraŭ rekte ĝis Akazien-strato, aŭ laŭplaĉe, agrable sekvi la Limmat-bordon. Akazien-strato situas en tute moderna kvartalo, kaj, granda verda standardo kudrita de Nelida WEIDMANN, la edzino de Dieter, signalis la kunvenojn. Tra larĝaj montrofenestroj ĉiuj preterpasantoj povas vidi, ke esperanto ja havas literaturon. En hela kaj blankmura ejo homoj jam babilis kaj trinkis kafon, dum aliaj vice sidis pretaj por aŭskulti la prelegantojn de la 'Rendevuo por aktivuloj'.

Tiu rendevuo estas nova tradicio enkondukita de Bruno GRAF, la prezidanto de SES. Ĉi-jare kelkaj

spertuloj alportis seriozajn konsilojn por varbadi. Sonja BRUN, humurplene kaj kun kompetento klarigis kiel starigi standon. Ŝi vere detaligis ĉiujn etapojn ekde la koncepto ĝis la munto «sen forgesi la angulpecon». Se vi volas imiti ŝin, mi forte konsilas, ke vi petu de ŝi la interesan dosieron, kiun ŝi afable disdonis. Patrick RENTSCH koncize enkondukis la temon «instruado per interreto». Jes, interreto ŝajnas ilo kreita unue por esperantistoj, sed multo restas por plibonigi tiun instruon servon. Patrick RENTSCH konkludis, ke li ankoraŭ ne trovis ekzemplon de reta kurso tute kontentiga. Marion BELISLE interalie fakiĝis pri gazet-komunikoj. Kiel peranto de la fama CD-eldonejo *Vinilkosmo*, ŝi estis delegita de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) por konigi al radio-elsendejoj ĝiajn du lastajn kompilitajn diskojn pri kanzonoj en esperanto. La interesa konkludo de tiu prezento estis instruiga rimarko de aŭskultanto: «*Por esti atentigita de la gazetaro necesas anonci ion novan*».

Post la tagmeza paŭzo en Migros-restoracio disvolviĝis la Ĝenerala Asembleo de SES en plena konsento. 21 partoprenantoj rajtis voĉdoni. Ĉirkaŭ 7 gastoj enskribiĝis sur la partopren-listo. El la jar-raporto komentariita de la

prezidanto ni ricevis la rezulton de la surstrata enketo farita de pluraj societoj je la iniciato de SES. Konas la ekziston de esperanto: 17% de la junularo, 52% de la mezaĝuloj, 55 % de la emeritoj. Entuziasmiĝas pri la lingvo 2 trionoj de la pridemanditoj, kiuj opinias, ke nia lingvo utilas. La alta procento de la junuloj, kiuj ne konas nian lingvon, estas incito por pli multe informi, kaj ni povas esperi, ke ilia nescio permesos al ili malkovri nian lingvon sen la antaŭjuĝoj de iliaj antaŭuloj.

Sekvis la prelego pri 'eŭropa identeco' de Zlatko TIŠLJAR el Slovenio. Eŭropa Unio estas certe evoluanta al federacia ŝtataro. Sed necesas okupiĝi pri ties identeco. Tiucele la preleganto longe traktis la koncepton de nacia identeco ekde la 18a jarcento, kiam la nocio nacio komencis koincidi kun tiu de la ŝtato. Li forte apogis sin sur propraj kaj familiaj spertoj. Loĝante en Kroatio liaj familianoj devis plurfoje ŝanĝi je ŝtata aparteno, do ŝanĝi sian identecon. De tio Zlatko TIŠLJAR forte emfazis la apartenon al pluraj identecaj grupoj, ekzemple nacia, regiona, eŭropa, ideologia, ktp. Li ankaŭ forte apogis la fakton, ke lingvo estas grava identigilo, do inter ili ankaŭ esperanto. Li alvenis al la konkludo, ke grava punkto de la eŭropa identeco estas

kaj devus esti la respekto de ĉies identecoj. Nenio evoluas rapide, do post longa tempo adopto de neŭtrala planlingvo kiel eŭropa lingvo, kial ne esperanto, povus fortikigi la eŭropan identecon. Sed tio dependas de kelkaj kondiĉoj, interalie ke regu la principo de lingva subsidiareco, kiel nun oni parolas pri politika subsidiareco. Tio favorus, ke la adoptita lingvo ne malaperigu la aliajn. Ĝi uziĝus, nur kiam tio estas reale necesa inter diverslingvuloj. Sekvis interesaj diskutoj, interalie pri karakterizoj de la svisa identeco. Eĉ se ni ne ĉiam samopiniis – malfacilas konsenti pri tiu temo, mi tre ĝojis interŝanĝi ideojn pri ĝi kun alemanoj kaj kun eksterlandanoj freŝdate loĝantaj en Svislando.

Sabate vespere, post fonduo sur la teraso, Anita ALTHERR revivis kun ni sian longan sperton en esperantio per fotoj ekde la jaroj sesdekaj. Ni vidis ŝin pretiganta la zurikan esperanto-bultenon en tute eta fraŭlina ĉambro. Ni spektis fotojn de gravaj esperantistoj, kiel Edmond PRIVAT. Kaj multaj el ni, kun iom da nostalgio, vidis sin maljuniĝi laŭ la fadeno de la jaroj!

Nelida WEIDMANN montris al ni pecojn de kubaj dancoj, kiujn ŝi instruas. Estus bona tempo por venonta aranĝo! Kaj dimanĉe matene post abunda matenmanĝo

nin regalis kelkaj sonetoj de Stanislav SKORUPSKI akompanataj de altkvalitaj muzikistoj, fakuloj pri tangomuziko.

Ni tre dankas al Nelida kaj Dieter WEIDMANN, per kiuj tiu semajnfino perfekte sukcesis.

Nicole MARGOT

Ĝenerala Kunveno

de la 15a de majo 1999

Zurika Esperanto-Librejo
Akazienhof, Akazienstrasse 6,
Zürich

Protokolo

Ĉeestas la estraranoj Bruno GRAF, prezidanto; Angelo MELLINI, sekretario kaj germanlingva reprezentanto; Barbara POCHANKE, kasisto, Nicole MARGOT, franclingva reprezentanto; 21 pliaj SES-anoj kaj 4 gastoj.

Senkulpigis Perla MARTINELLI, Claude GACOND, Nicole BEROU, Mireille GROSJEAN, Gertrud EGGENBERGER, Ernst GLÄTTLI kaj Annelies FIECHTER.

Bruno GRAF, la prezidanto, mencias la sukcesan antaŭtagmezan programon kaj malfermas la Ĝeneralan Kunvenon je la 14h10. Li kore salutas la alvenintojn kaj esprimas sian dankon al

gesinjoroj Dietrich. kaj Nelida WEIDMANN pro la invito kaj bona organizo de la ĉi-jaraj SES-tagoj.

1. Komunikoj de la prezidanto

La prezidanto :

a) petas Dietrich WEIDMANN laŭtlegi salutleteron, kiun sendis d-ro Renato CORSETTI, vicprezidanto de UEA ;

b) sendas bonajn dezirojn al Ernst VON MAY, kiu bedaŭrinde estas grave malsana ;

c) petas pardonon pro la ne-kutima, iom malfrua dato de la Ĝenerala Kunveno kaj pro la kolizio kun la fervojista kongreso ;

ĉ) faras alvokon favore al membriĝo al SES kaj citas la kialojn por tion fari ;

d) montras kaj disdonas la novan informilon por varbi SES-membrojn kaj la vizitkarton en la germana lingvo ; ambaŭ varbiloj estas senkoste haveblaj ;

e) konfirmas Sonja BRUN kiel tagprotokolanton.

2. Elektro de la voĉnombrantoj

Elektiĝas: Angelo MELLINI kaj Lucien DAHAN. Entute estas 21 voĉoj.

3. Protokolo de la last-jara jar-kunveno (21.03.98), publikigita en *SESi* 1998-3

Necesas korekto sub la traktajo 6a : Jarkalkulo, bilanco, buĝeto: La nomo de Eva VISCHER estas malĝusta kaj devas esti anstataŭigita per Arlette DI VETTA. Ne

estas kromaj rimarkoj kaj la protokolo estas unuanime aprobita kun la koncerna amendo.

4. Agadraporto 98 kaj agadplano 99

La jarraporto 1998 de la prezidanto estis publikigita en *SESi* 1999-2. Speciale estas menciindaj :

a) SES havas novan leterpaperon kun moderna leterkapo, kreita de Rolf ERNST.

b) Agotago 1998: En 6 urboj, nome , Genève, Lausanne, Bern, Luzern, Wil kaj Basel okazis varbado kaj surstrata enketo. Entute proksimume 700 personoj el tri aĝgrupoj estis pridemanditaj laŭ plano por doni bazon al informa laboro. Jenaj estis la rezultoj: 17% de la junuloj, 52% de la mezaĝuloj kaj 55% de la pli-aĝuloj konas esperanton. De la 190 personoj, kiuj sciis, ke esperanto estas lingvo, 1/3 estis negativa, 2/3 estis pozitivaj.

c) Por la agotago 1999 estas nova ideo: Rolf ERNST kreas afiŝon, kiu estos elmontrita en librovendejoj kaj en aliaj similaj taŭgaj lokoj varbante por la libreto '*Esperanto Wort für Wort*', Kauderwelsch Band 56.

La jarraporto 98 kaj la agadplano 99 estas aprobitaj per 18 voĉoj.

Aldone Bruno GRAF donas la jenajn informojn:

a) Ekde la 3a ĝis la 9a de junio 1999 okazos la 2a svisa 'Lern-festivalo', kiu donos la eblecon havi informstandon aŭ/kaj disdoni informilojn.

b) La Regionaj Kunvenoj, kiuj depost jaroj okazis en Cully sub la organizo de Nicole MARGOT, ne plu estas daŭrigotaj. Anstataŭe ĉi-jare SES provos organizi internacian renkontiĝon en Genève la 23an de oktobro 1999, kie Claude PIRON prelegos.

c) La 6an de marto 1999 okazis strategia kunveno en Bern. Tazio CARLEVARO desegnis iomete pesimisman bildon sub la temo « *Cu Esperanto postvivos la jaron 2045 ?* » dum Perla MARTINELLI distribuis optimismon. En *SESi* 1999-2 aperis ampleksaj raportoj de Andy KŪNZLI kaj Claude GACOND pri tiu evento.

La rekomendoj de Bruno GRAF estas :

Ni estu realismaj en la agado ;

Ni eltenu kritikon;

Ni kreu inter ni novan bildon ;

Ni serĉu novajn motivojn, kiel ekzemple internacian kulturon.

Vidu la libron '*Esperanto venkos malgraŭ la esperantistoj*' de Zlatko TIŠLIJAR.

Giorgio SILFER aldonas, ke ni devas memori, ke esperanto apartenas al la normala evoluo de la homaro. Ni devas mezuri nin laŭ ĝiaj ŝanĝoj. La stagnado de la societaj membraroj ne estu nia

mezurilo pri la esperanto-evoluo. Konsideru la evoluon inter 1991-1998: esperanto trovas lokon ekzemple inter la tutmondaj salut-vortoj de la Papo, ĉe la Internacia PEN, en rilato kun la defendo de la Homaj Rajtoj. Tiuj atingoj dependis de aktivaj esperantistoj, ne nur de societoj.

5. Jarkalkulo kaj bilanco 98, raporto de la kaskontrol-antoj kaj buĝeto 99

Detaloj aperis en *SESi* 1999-2.

Barbara POCHANKE klarigas, ke la malprofiton ĉefe kaŭzis la fakto, ke la kolektiva abono por *Literatura Foiro* estis en 1998 pagita por la jaroj 1998 kaj 1999. Tial ankaŭ ne estas cifero por tio en la buĝeto por 1999, kiu montras malgrandan profiton.

La jarkalkulo kaj bilanco 1998 kaj la buĝeto 1999 estas unuanime aprobitaj.

6. Diversaĵoj

Per minuto da silento ni memoras al niaj mortintaj membroj Dante BERTOLINI (honora membro), Emmerich MANNER, Ardachès STAKIAN, Vojslav PITLOUN kaj Mathilde LŪTHI.

Bruno GRAF atentigas pri la interesa Internacia Turista Semajno okazonta en Malto de la 4a ĝis la 10a de oktobro 1999.

Giorgio SILFER informas pri jenaj eventoj:

a) En 1998 okazis la 1-a sesio de la nova esperanto-ekzameno en Svislando, por kiu la SES-membroj pagas duonan kotizon. Sukcese ekzameniĝis en la 1-a grado Koni REY kaj Anna LASZAY. La 2a sesio okazos la 21/22an de aŭgusto 1999 en La Chaux-de-Fonds. Ekzamenoj por la 1-a kaj 2a grado ankaŭ eblas ĉe la lokaj grupoj. Interesuloj turnu sin al la Kultura Centro Esperantista (KCE) en La Chaux-de-Fonds. La 3a grada ekzameno okazos en La Chaux-de-Fonds post la literatura semajno (17-22 de aŭgusto 1999).

b) SES rajtas sendi delegiton al la 2a Forumo de la Esperanta Civito okazonta koincide kun la SAT-kongreso (27-29 de julio 1999) en Karlovaro/Karlovy Vary (Ĉeĥio).

Zlatko TIŠLJAR informas pri 2a semajnfino en Maribor pri video-filmoj en esperanto.

Giorgio SILFER mencias la 1-an kunvenon de mezeŭropaj esperanto-asocioj plus Pollando kaj Slovenio kaj demandas, ĉu valorus al SES sin kupli per observantoj aŭ delegitoj al tiu mezeŭropa aranĝo. Oscar PRINZ, ĝia organizanto kaj ankaŭ la prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio, ne vidus ion kontraŭ la aliĝo de SES al tiuj internaciaj renkontiĝoj. La asembleo rajtigas la Estraron senpere decidi pri la

sendo de delegito aŭ observanto al la supernaciaj kunvenoj menciitaj de Giorgio SILFER.

Anita ALTHERR atentigas pri la kongreso de Eŭropa Vegetarana Unuiĝo (EVU) okazonta de la 18a ĝis la 23a de julio 1999 en Widnau. La kongreson ankaŭ partoprenos esperanto-grupoj.

Al la demando de Carolo NICOLodi « *Kial nur estas raportoj pri naciaj eventoj en SESi ?* » kaj al la propono de Alexis Otero CASTELLON, ke « *Oni indiku mallonge ĉiujn internaciajn eventojn* », Giorgio SILFER respondas, ke *SESi* havas la taskon informi pri tio, kio okazas en Svislando. Pri la eksterlandaj eventoj ekzistas la rajto raporti laŭ la ebloj kaj laŭ la juĝo de la redaktoro.

Kun danko al ĉiuj la prezidanto fermas la Ĝeneralan Kunvenon 1999 je la 15h45.

La protokolinto : Sonja BRUN, Rotkreuz, 1999-05-17.

Koncepto por la Ago-tagoj 1999

La laborgrupo pri varbado diskutis kaj elektis ideon por la Ago-tagoj 1999 : vendigi en libro-vendejoj kaj magazenoj la

modernan lingvogvidilon por gejunuloj *'Esperanto für Globe-trotter'*, nun titolita *'Esperanto Wort für Wort'* en la dua eldono.

La enketado surstrata 1998 montris, ke nur 17% de la gejunuloj scias pri esperanto. Tial tiu koncepto alparolas la junularon.

Fakto estas, ke ni havas materialon prezenteblan kaj vendeblan, sed ke ni ne eluzas sufiĉe tiun eblon. Vendi por atentigi kaj allogi. Certe esperanto estas produkto vendebla.

La germanlingva teamo de la laborgrupo preparas la necesan ilaron: afiŝon, provekzempleron de la lingvogvidilo *'Esperanto Wort für Wort'*. Disponeblaj estas la informilo *'Was Sie schon immer über Esperanto wissen wollten...'* kaj la vizitkartoj de SES.

Ni invitos la lokajn grupojn kaj la membrojn kontakti la estrojn de librovendejoj kaj magazenoj, kie ni estas klientoj, por rajti pendigi la afiŝon dum 2-3 semajnoj, kaj se eble disponigi informilojn kaj vizitkartojn por favori kontaktojn kaj informi pli detale. La librovendejoj rekte vendos la lingvogvidilon.

La projekto estas plenumbla de lokaj grupoj kaj de membroj sen kostoj kaj sen preparoj. Sed kiel lastjare necesos agemo kaj kuraĝo. La grupo, kiu sukcesos

pendigi plej multe da afiŝoj, ricevos premion de SES.

Tiu projekto estas germanlingva kaj tial realigebla nur en la alemana regiono. La franclingva teamo de la laborgrupo procedos samsence kaj laŭ la lokaj ebloj romandaj.

Bruno GRAF. 1999.04.08

Donacoj

La kasisto Barbara POCHANKE dankas pro la sekvaj donacoj en CHF:

Lucienne DOVAT: 5; Walter GIANNINI: 55; Gertrud MERZ: 30; Carlo NICOLodi: 45; Willy RIESER: 5; Paul RÜEGG: 30; Lilly SCHAEERER: 25; Doris SCHMID: 55; Elsbeth WALDER: 40; Gisèle WEIL: 25.

Agado 2003

Ni trankvile alproksimiĝas al la centjara jubileado de la fondo de SES en 2003 kaj de la esperantiĝo de la pioniroj Edmond PRIVAT kaj Hector HODLER.

Ĉar ni ŝatus profiti tiun okazon ne nur por rememorigi pasintajojn, sed por iniciati por-

esperantan kampanjon je la niveloj kultura, lerneja, politika kaj ĵurnalisma, jam ekde kelkaj jaroj ni alvokas favore al la nutro de agad-fonduso nepre necesa por la realigo de la projektoj. Tial ni vigle esperas, ke la aldonita poŝta pagilo trovebla en tiu ĉi numero de *SES informas* 1999-3, sur kiu klare legiĝas la indiko **Agado 2003**, instigos multajn legantojn de *SES informas* al donacemo.

Ĉiu vigle konsciuj, ke sen konvena monsumo ni ne povos alporti aktivan apogon al la redakta aktiveco de nia historiisto Andy KŪNZLI per aĉeto de signifa nombro da ekzempleroj de la enciklopedia verko, kiun li pretigas kiel ĝeneralan raporton pri la disvolviĝo en Svislando de la planlingva ideo mem, kaj de esperanto. Tiun libron ni ŝatus povi disdoni al lernejoj kaj publikaj bibliotekoj profitante la okazon por instigi la lokajn kaj fakajn gazetojn raporti pri la kulturaj atingoj de esperanto kaj tute speciale pri la rolo de Svislando en tiuj atingoj.

Hector HODLER kaj Edmond PRIVAT ne nur ludis signifan rolon en esperantujo. Ambaŭ ĝenevanoj ankaŭ influis vastan publikon per sia ĵurnalista aktiveco franclingva. Nia pola samideano Tomasz CHMIELIK ĵus konkludas pli ol dekjaran kopi-laboron tre gravan. Komputile li registris ĉiujn

artikoloj de PRIVAT aperintajn en la socialista taggazeto *La Sentinelle*, en la kooperativa semajna organo *Coopération* kaj en la soci-religia revuo *L'Essor*. La indeksado de tiu artikolaro donos la eblon pretigi dulingvan artikol-antologion, kiu rememorigos al la publikoj franclingva kaj esperanta la pioniran rolon de la biografo de Lejzer Zamenhof kaj de Mahatma Gandhi. La livero de rememorigaj raportoj al la ankoraŭ aperantaj periodaĵoj *Coopération* kaj *L'Essor* kaj al la organoj de la socialismaj kaj porpacaj organizaĵoj donos la okazon klarigi la edukan valoron de esperanto apoge al la kontraŭo de Eŭropa Unio kaj Unuiĝinta Naciaro.

La franclingva ĵurnalista aktiveco de Hector Hodler estas malpli konata, ol tiu de lia amiko Privat, sed ĝi certe kontribuis al la instaliĝo de Ligo de Nacioj en Genève. Okaze de la eksplodo de la milito en Kosovo kaj Serbio pluraj esperanto-gazetoj republikigis lian alvokon *Super*, kiu aperis komence de 1915 en lia revuo *Esperanto* kaj tio montris, kiom aktuala restis la penso de la filo de la pentristo Ferdinand HODLER. Indas rememorigi lian ĵurnalistan kontribuon per pretigo de antologia verko ankaŭ dulingva, ĉar paralele al sia artikolaro pri la temo milito kaj paco aperinta en

Esperanto, li subskribis per la pseŭdonomo HOMO franclingvan artikolaron, kiu influis vastan publikon ne nur en Romandio kaj Francujo, sed ankaŭ adeptojn de mondfederacio ĝis Usono.

Ni trankvile pretigas tiujn antologiajn verkojn esperante, ke via malavareco subtenos tiujn projektojn.

Por ke la **Agado 2003** plene efiku, ankaŭ devos ekzisti gamo da modernaj informiloj kaj instruiloj en la kvar lingvoj de Svislando. Niajn fortojn ni ankaŭ dediĉas al la redaktado kaj eksperimentado de tiu didaktika materialo.

Nome de SES, Claude GACOND antaŭdankas pro via donacemo.

Redaktaj limdatoj

Por *SES informas 1999-4* (septembro + oktobro): 20an de aŭgusto.

Por *SES informas 1999-5* (novembro + decembro): 20an de oktobro.

Movada vivo

Ni povas anonci kaj raporti nur laŭ la sciigoj, kiujn ni ricevas. Dezirindus, ke post ĉiu esperanto-kunveno responsulo mallonge

raportu al la redaktoro de *Svisa Esperanto-Societo informas* pri la okazintaĵoj kaj samtempe anoncu al ni la datojn kaj programon de la venontaj aranĝoj. Tro da lokaj societoj neglektas tion. Ni reale bedaŭras tiun stagnemon, kiun reŝpegulas nia organo per neniaĵo post grupaj anoncoj aŭ per simpla malaperigo de la nomoj de societaj rubrikoj.

CDELI

Centro de Dokumentado kaj Esploro
pri la Lingvo Internacia
Biblioteko de la Urbo

Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds
☎ 032 967 68 55.
Fakso 032 967 68 29.

CDELI posedas kolekton da video-filmoj. La merkredajn vesperojn 9an kaj 23an de junio de la 20h00 ĝis la 22h00 ni organizos spektadon de pluraj el tiuj filmoj. Ni kore invitas ĉiujn esperantistojn de la regiono ĉeesti tiujn film-prezentojn, post kiuj ni malfermos mallongan kritikan diskuton. Do ĝis baldaŭ !

Dum la julia monato okazos riparoj en la lernejo, kie situas CDELI. Tial ĝia laborsalono estos fermita dum la tuta monato por lukti kontraŭ polvo-invado. La aktiveco de CDELI rekomenciĝos la 2an de aŭgusto.

Sunhejmo en Rheineck Sukcesa renkontiĝo

La sabaton 8an de majo internacia kaj intergeneracia etoso regis en Sunhejmo en Rheineck, kiam dekduo da svisaj esperantistoj kaj da gesamideanoj el Francio, Belgio kaj Germanio obeis la inviton de Hans KÄSTLI kaj ĝuis lian grandaniman gastigadon. Lia Sunhejmo estas ideala renkontiĝejo kaj tie ĉiu nekrokodilema esperantisto tuj sentas sin hejme.

Kvaropo da samideanoj jam alvenis vendrede vespere kaj havis tiel eblon interkonatiĝi dum longhoraj diskutoj pri la celoj kaj la nuna stato de nia lingvo. Tiom da kapoj, tiom da opinioj pri la landnomoj, la tradukarto, la vortfarado. Bonas, ke ekzistas la *Fundamento de Esperanto* kiel lingvo-apogilo kaj la estonta *PIV* kiel espero por (eble) ĉesigi la disputojn.

La spektado de la videobendo '*Espere-despere*' kun la tri teatraĵoj '*Budapesta Ekzameno*' de Sándor SZATHMARI, '*Lingva Evoluo*' de Julio BAGHY, kaj '*La vorta klaso*' de Giorgio SILFER estis akvo sur la muelejoj de la samaj problemoj kaj la diskutoj de la antaŭa vespere revekiĝis.

Krome estis malfacile eltrovi, kion reale signifas «*Ne paroli lingvon sed lingvi parolon*» aŭ «*Serĉi la subtekston kaj trovi la duan nivelon*» kiel sugestas la enkonduko al la lasta teatraĵo. Ni memorigu, ke la videobendo '*Espere-despere*' aĉteblas ĉe LF-koop en La Chaux-de-Fonds.

Tamen sufiĉe da tempo restis por babilado, promenado kaj ĝuo de la grandioza elvido. La partoprenantoj rehejmiĝis kun memoroj pri agrabla kunestado ligita al bonaj manĝoj kaj espereble ankaŭ iom da kleriĝo.

Al Hans KÄSTLI, nome de ĉiuj, elkoran dankegon.

Sonja BRUN, Rotkreuz

Basel

Esperanto Societo Basel

PF 103, 4005 Basel

☎ 0049 76 214 57 12

Kunvenoj: 20h00 en Altersheim, Neubad

Venonta kunveno

Junio 24: Patrick RENTSCH raportos pri esperanto en interreto.

Por la legemuloj

En aprilo estis eldonita speciala numero de la societa organo '*Kuriero de Esperanto*' kun plena listo de la libroj de la biblioteko de la grupo. Per tiu bibliografio ĉiu povos pli facile elekti legaĵojn.

Genève

Esperanto-Grupo "La Stelo"

Case postale 188, 1211 GENÈVE 20

☎ 022 740 04 45

Monat kunveno ĝenerale ĉiun unuan

mardon en la restoracio « *Les*

Cheminots », 7, rue des gares, Genève

Monataj kunvenoj

Julio je sabato 18a je la 15h00
sur la insulo Rousseau.

Aŭgusto je sabato 21a je la 15a
horo sur la insulo Rousseau.

Septembro 7

Oktobro 5: kun Ernst GLÄTTLI
el Brugg, kiu raportos pri ne-
forgeseblaj travivaĵoj okaze de
vojaĝo tra la balkanaj landoj.

Studrondo

Junio 22 je la 16h00 ĉe Anita
Altherr, rue de Bernex 340,
Bernex.

Cours d'espéranto

Université populaire
du Canton de Genève

Inscription dès août 1999

☎(022) 345 50 10

Raportoj

12 personoj ĉeestis la majan
kunvenon por aŭdi François
Randin el Lausanne rakonti pri sia
vojaĝo kaj restado en tanzania
esperantujo. Per vidbenda filmo li
prezentis la esperantiston Charles,
kiu gvidis lin en plej diversajn
lokojn de Tanzanio.

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

Case postale : 389, 1009 PULLY

☎: (021) 729 58 02

E-mail: lausanne.ch @ esperanto.nu

Homepage: <http://www.esperanto.ch>

Kunvenoj: Stacidomo, 1-a etaĝo, 20h30

Diskuta rondo: ĉiunmonate je la tria lundo
en hotelo Continental : 18h00-20h00.

Ekskurso je la 27a de junio al
Estavayer per sipo el Yverdon kun
vizito de naturaj kaj muzeaj vid-
indaĵoj. Petu la definitivan
programon al Jacqueline Vasserot,
Coteau 21, 1009 Pully. ☎ (021)
729 58 02.

La aprila organo de Laŭzana
Esperanto-Societo informis pri la
morto de Marcel VIREDAZ okaz-
inta la 28an de marto 1999. Kiel
kartografo de la kadastra oficejo
en Lausanne li perfekte konis la
kantonon Vaud kaj ekde sia
esperantiĝo en la sepdekaj jaroj li
plurfoje migrigis la lokajn
esperantistojn al interesaj vidind-
aĵoj. Lia unua profesio kaj hejma
hobio estis la keramika arto. Por
la svisa ekspozicio de 1964 li
verkis broŝuron pri la romanĉaj
lingvoj.

Venontaj kunvenoj

Septembro 6

Oktobro 4

Novembro 8

Decembro 12: **Zamenhofa festo.**

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke
Ø 041 280 46 12.

Kunvenoj: ĉiun duan jaŭdon de la monato: 19h30: paroliga leciono; 20h00: babilado; 20h20: interŝanĝo de informoj; ĉirkaŭ 20h45: komenciĝas la anoncita parolado. Kunvenejo: Hotelo-restoracio Emmenbaum, Gerliswilstr. 8, 6020 Emmenbrücke, atingebla per trolebuso 2 de Lucerno kaj de la regiona trajno ĝis haltejo-stacidomo Emmenbrücke (ĉ. 100 m).

Informoj ne venis.

Wil

Esperanto-Klubo Wil

S. POCHANKE, Letenstr. 70, 9500 Wil
Ø 071 911 68 30

Kunvenoj: 20.00 en la Restoracio Schweizerhof, Unt. Bahnhofstr. 18

Informoj ne venis.

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

PF 858, 8034 ZÜRICH Ø 01 251 50 25

Kunvenoj: 19h15, Akazienstrasse 6,
8008 Zürich

Informoj ne venis.

Ni kleriĝu !

La anonco pri la aprilaj staĝoj, kiujn mi estis gvidonta en la esperanto-centro Kvinpetalo en Bouresse, instigis Yvette GOY en Cully kaj Marguerite JACCARD en Château d'Oex veturi al Bouresse. Tiel ili intimiĝis kun la agrabla etoso reganta en Bouresse dankal la sindono de Suzanne BOUROT kaj de Georges LAGRANGE kaj de ties kunlaborantaro.

Kiam ili aliĝis, ne restis plu partopreneblo en la unua semajno, tial nur la duan staĝon ili povis frekventi. Bedaŭrinde por ili pro la subita morto de mia patrino Gabrielle GACOND mia instruado estis draste interrompita mezstaĝe; tamen tucerte Georges LAGRANGE kun la plej lertaj staĝanoj kapablis pluevoluigi la studon de la materialo, kiun mi estis lasinta.

Tial niaj du svisinoj verŝajne re-hejmiĝis kun agrabla memoro pri la samideana vivo en Kvinpetalo. Per siaj rakontoj ili instigu aliajn SES-anojn veturi al Bouresse por kleriĝi kaj praktiki esperanton.

La progreso de esperanto eble pli dependas de nia kapablo reale kleriĝi rilate al esperanto mem, ol de nia propaganda energio. Tial mi regule mencias la kurs-programojn de la centroj KCE en La Chaux-de-Fonds, Kvinpetalo

en Bouresse kaj de la kastelo Grésillon, kun la espero, ke tiu informado instigos la legantojn de *SES informas* dediĉi parton de siaj ferioj al studaj restadoj.

Claude GACOND

K.C.E.

**Kultura Centro Esperantista
Strato Postiers 27, Poŝtfako 311
2301 La Chaux-de-Fonds.
☎ kaj fakso: (032) 926 74 07.**

Kurs-programo

Julio 20-26

Enkonduko al jago kun Fernando VURPILLOT.

Aŭgusto 13-16

18a Internacia Literatura Forumo de LF-koop, pri 'Stelan Engholm : lia vivo kaj lia verkaro' kun Leen DEIJ, Perla MARTINELLI, István NEMERE, Giorgio SILFER kaj Ljubomir TRIFONĈOVSKI.

Aŭgusto 17-22

2a Plurnivela Internacia Kursaro, por komencantoj kun Ljubomir TRIFONĈOVSKI, **por progresantoj (literaturo)** kun Giorgio SILFER.

Septembro 24-26

Kultura Monاتفينو.

Oktobro 23-24

Kultura Monاتفينو.

Novembro 27-28

Kultura Monاتفينو.

KVINPETALO

Esperanto-Centro

Rue du Lavoir, FR-86410 BOURESSE
Tel. Kaj fakso : 0033 549 42 80 74

Kurs-programo

Julio 6-10

Progresiga kurso kun Paul GUBBINS per la novelaro '*La maŝino, kiu krias*', kiu estos aĉetebbla surloke.

Inicado kaj praktikado de jago kun Arlette PLUTNIAK.

Julio 13-17

Trikado de pupovestoj kun Marie MALEZIEUX-HUNNINCK.

Tradukado de teknikaj kaj literaturaj tekstoj kun Georges LAGRANGE.

Julio 20-24

Nuntempaj poetikoj kaj poezioj de modernaj esperanto-poetoj kun Miguel FERNANDEZ MARTIN.

Aŭgusto 10-14

Preparado al la skriba parto de la ekzameno 'kapableco' kun Georges LAGRANGE.

Aŭgusto 17-21

Per esperanto prezento de naciaj lingvoj kunordigita de Johano RAPLEY.

Aŭgusto 27-29

Taj-ĉi-ĉuan (ĉinaj ekzercoj kaj ilia filozofio) kun Petro SMITH.

Septembro 10-15

La esperanta literaturo ekde 1952 kun Ed BORSBOOM.

Oktobro 26-30

Paroliga praktikado de la lingvo per noveloj de Tibor SEKELJ kaj artbildoj kun Juanita TURBILLON.

Decembro 10-15

Zamenhofa semajno kun Georges LAGRANGE.

Kastelo Grésillon

Esperantista Kulturdomo
FR-49150 BAUGÉ
☎ 0033 241 89 10 34

Kurs-programo

Julio 24-31

Lingvistiko, vortaro kaj traduko kun D. LEVY.

Kantoj kaj gitara muziko kun Monika KIMEL.

Esperanto por komencantoj kun Przemek GRZYBOWSKI.

Aŭgusto 1-7

Esperanto por komencantoj kun Przemek GRZYBOWSKI.

Progresigaj kursoj kun Georges LAGRANGE kaj D. MOIRAND.

Patchwork kun Marie MALEZIEUX.

Aŭgusto 8-14

Esperanto kun D. MOIRAND.

Jogo kaj esperanto kun Rose-Marie LAVEAU.

Aŭgusto 15-21

Meznivela kurso kun Ch. RIVIERE.

Teatro kun Sylvie BONNET.

Literaturaj teatraj tekstoj kun J. DUMOULIN.

Por ĉiuj kursoj aliĝilojn oni petu de kaj resendu al Janine VINCENT, 26 bis, rue de Milngavie, FR-49500 BAUGÉ. ☎ 0033 241 89 04 94.

Pro riparoj en la kastelo ne eblos tranokti en la kastelo mem. Tial por la loĝado aŭ kampado oni rilatu kun Paulette NAULET, au Bourg, FR-49490 BREIL. ☎ 0033 241 82 55 22.

Feliĉajn feriojn !

Ni deziras feliĉajn feriojn al la legantoj de *SES informas*. Kaj ni antaŭdankas al ĉiuj, kiuj sendos al ni raporteton aŭ vivsignon pri sia partopreno en esperanto-kongreso aŭ en unu el la staĝoj ĉi-supre menciitaj.

Morto

Gabrielle Gacond

6 julio 1908 – 21 aprilo 1999

Antaŭ ol forlasi nian mondon Gabrielle GACOND komprenigis al sia samideanino Marie-Louise MÜNGER, kiun ŝi elektis por prononci ŝian funebran paroladon, ke ŝi nepre menciu, ke per esperanto larĝiĝis ŝia viv- kaj penshorizonto. Simpation por la penso kaj lingvo de ZAMENHOF ŝi akiris unue tra legado de gazet-artikoloj de Edmond PRIVAT en la revuo *L'Essor*. Kaj ekde la fondo en 1968 de Kultura Centro Esperantista, ŝi fariĝis regula frekventanto de ĝiaj studaj semajnfinoj kaj feriaj kursoj kaj ankaŭ unu el ĝiaj viglaj apogantoj.

En 1974 ŝi transprenis la taskon arkivigi gazetartikolojn kun mencio de esperanto, kiujn ricevas Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia. Tiun funkcion ŝi nelacigeble plenumis kun grandaj disciplino kaj entuziasmo, veturante ĉiusemajne po unu tagon de Neuchâtel al La Chaux-de-Fonds. Ŝi kunportis piknikaĵon kaj laboris ofte en trankvila soleco unue en KCE ĝojante, kiam renkonteblas gastoj. Kaj ekde mia emeritiĝo el la funkcio de direktoro de KCE, ŝi retrovis nin en CDELI. Eĉ kiam

ŝiaj fortoj kaj vido komencis malvigliĝi, ŝi tamen venadis, ne timante alfronti la vintran neĝadon sur la vojo al la biblioteko. Nur la akriĝo de ŝia blindiĝo devigis ŝin meti finon al tiu aktiveco en la printempo de 1998, do unu jaron antaŭ la morto.

Ŝi multe legis notante kun atento ĉiujn novajn vortojn kaj esprimojn kaj vojaĝis al kongresoj kaj konferencoj ne nur en Svislando mem, sed vizitante tiel la landojn Germanio, Danlando kaj Svedio. Ŝi elektis regionojn nefranc-lingvajn, ĉar ŝi nepre volis eliri franclingvion.

Per siaj kontaktoj kun esperantistoj ŝi konatiĝis kun Marc ROHRBACH kaj lia movado JEAN, al kiu ŝi aliĝis.

En la help-organizaĵo Servo Civila Internacia ŝi ankaŭ aktivis favore al nia lingvo, liverante pensojn en esperanto por ĝia jaragendo. Ŝi ne nur esperantigis mesaĝojn de saĝuloj, ŝi ankaŭ kuraĝis proponi proprajn pensojn. Kaj estas unu el ili, kiu estis elektita kiel esperanta atestaĵo por ŝia mort-anonco :

La domo, kies ŝturoj estas fermitaj dumtage, restas en mallumo, sed ne kulpas la suno !

Tiu ĉi mesaĝo de Gabrielle GACOND fariĝis la gvid-fadeno de la adiaŭa oratoraĵo de Marie-Louise MÜNGER.

Ŝia filo Claude GACOND

P.P.

CH-2305

La Chaux-de-Fonds 5

Dieter ROOKE, Äussere Klus, 4702 Oensingen, proponas interŝanĝon de son- kaj vid-bendoj kaj volonte akceptas polvkovritajn librojn kiel edukon materialon por 10-jara knabo.

Ree ŝercis la koboldoj !

Estas sub la kripligita titolo *Bibliografio di Ido*, ke publikiĝis mia recenzo pri la *Bibliografio di Ido*, malgraŭ mia atentega relego de la rubrikaj titoloj de *SES informas* 1999-2. Kiuj legis la koncernan artikolon, tiuj tiuj komprenis, ke ne pri la **vivo** de Louis COUTURAT aŭ de Louis DE BEAUFONT ĝi temis, sed pri **bibliografio** de la libroj kaj periodaĵoj aperintaj en ilia esperanto reformita. Mi petas pardonon al Tazio CARLEVARO kaj Reinhard HAUPENTHAL pro tiu kripligita titolo.

Claude GACOND

Leg-instigo

Kiam alvenas la someraj ferioj, ne nur veture mi vojaĝemas, sed ankaŭ lege. Migradon tra nia literaturo mi entreprenis ĉi-jare per eklego de la 536-paĝa verkego *Kritiko kaj recenzistiko en esperanto* de Karolo Piĉ, kiun ĵus eldonis Edition Iltis, kies nova korespond-adreso estas nun La Saousse, FR-84340 Malaucène (Francio). Ĝin mi mencias por kuraĝigi legemulojn ankaŭ venigi la menciitan valoregan libron por trankvile kleriĝi rilate al la kultura trezoro, kies portanto estas la zamenhofa lingvo.

La unua parto dediĉita al la temo literaturo, konservanto de lingvo-vivo, ĝuste atentigas nin pri la graveco de la homaranisma penso, kiel viviganto de nia lingvo. Ĝi inspiris kaj ankoraŭ nun donas neordinaran viglon al originala literaturo, kiu fariĝis voĉo de socia medio, al kiu ni apartenas.

Claude GACOND

Aldonaĵo kunsendita (1):

Impiangsschein / RECEIPSE / RICEVUTA

Einzahlung für / Versement pour / Versamento per

CREDIT SUISSE
8022 ZH-RATHAUSPLATZ

Zugunsten von / En faveur de / A favore di

653677-40-1 4862
CS ZUERICH-RIGIPLATZ
SVISA ESPERANTO-SOC.
2305 LA CHAUX-DE-FONDS
'AGADO 2003'

Konto / Compte / Conto 80-2372-3

Fr. c.

Einbezahlt von / Versé par / Versato da

Die Annahmestelle
L'office de dépôt
L'ufficio d'accettazione

Einzahlung Giro

Einzahlung für / Versement pour / Versamento per

CREDIT SUISSE
8022 ZH-RATHAUSPLATZ

Zugunsten von / En faveur de / A favore di

653677-40-1 4862
CS ZUERICH-RIGIPLATZ
SVISA ESPERANTO-SOC.
2305 LA CHAUX-DE-FONDS
'AGADO 2003'

Konto / Compte / Conto 80-2372-3

Fr. c.

Versement Virement

Mitteilungen / Communications / Comunicazioni

AGADO 2003

Giro aus Konto
Virement du compte
Girata dal conto

Einbezahlt von / Versé par / Versato da

Versamento Girata



000000000008620653677400015+ 070486279>

800023723>

P + A SA10.97 90000000

PTT 442.03